Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ

https://translate.google.com/

PLENUMITA 05/01/2017 Tricenttria eldono (unua eldono 20/09/2011)



Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Marcel Leereveld



SENDATA AL 305. La informa kaj noma paĝoj reaperos nur en la dekaj eldonoj

Ekstudis pli ol **670,000** lernantoj en la Esperanto-kurso de Duolingo.
https://www.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto-Online (Ekde la 28a de Majo 2015)

★★

Gramatika Ekzerco 2.



En la uzado de lingvoj estas kutimo, ke en certaj cirkonstancoj la normala origina signifo de vorto aŭtomate plilarĝiĝas. Se mi diras al vi “Dum la nokto hundo bojis la tutan tempon”, tio krome signifas, sen mencio, ke mi aŭdis la bojadon kaj ke mi dum certa tempo ne dormis. “Vidi iun” signifas nur ke ies bildo aperas en miajn okulojn, sed se vi diras al mi, ke vi vidos min morgaŭ lunĉhore en la restoracio, tio signifas, sen mencio, ankaŭ ke vi parolos al mi, kaj ke ni manĝos en la restoracio. Same se mi diras al vi “Mi jam vidis tiun filmon”, vi komprenas ke mi ne vidis la filmrolon, sed ke mi vidis la surfilmaĵon sur ekrano dum du horoj, kaj, nemenciite, ankaŭ ke mi aŭdis kaj rigardis kaj aŭskultis la filmon. Tiu nemenciata aldono al la frazo “Mi rigardis la filmon” estas kutima en etnaj lingvoj kaj en Esperanto. Sen tio ni bezonus, en Esperanto kaj en etnaj lingvoj, krei centojn da ekstraj vortoj por la diversaj kombinaĵoj de kompletaj signifoj. Ni en la etnaj lingvoj ne estas tiom stultaj. Do ni ne havas specialan vorton por KAJ vidi KAJ paroli KAJ manĝi en la restoracio, nek specialan vorton por rigardi filmon aŭ rigardi televidon aŭ rigardi piedpilkludon. Nur Esperanto estas tiom stulta krei specialan vorton por “aŭskulti kaj rigardi ekranon sur kiu ludiĝas filmo aŭ io alia”, por kio ni en la pli inteligentaj etnaj linvoj diras nur “rigardi filmon”. Ĉu trakti ĉi tiun idiotaĵon “spekti” kiel escepton? Aŭ ĉu krei pli kaj pli da tiaj nenecesaj vortoj, ekz. “spikti” por rigardi piedpilkludon kaj “spukti” por rigardi muzeon? Kaj “familo” kaj “ordoo” por la zoologiaj/botanikaj terminoj? Kiu strangulo inventis tiujn idiotaĵojn “spekti” kaj “specio” nenecesajn kaj esceptajn? Kaj kiuj blinde kopias ŝin aŭ lin? Lernu Esperanton, la lingvon kiu ne havas eviteblajn esceptojn kaj kies gramatiko estas regula?

Marcel Leereveld.




★★★

El Adelajdo







La plej nova Esperanto-lernanto de Trevor Steele estas pensiulo Ron Lane, kiu korespondas kun Trevor per la tradiciaj poŝtaj servoj. Dum siaj ferioj Trevor vizitis sian lernanton en Murray Bridge kaj pasigis en lia domo agrablajn horojn.

Katja Steele

Surfote: instruisto kaj lernanto

★★★

Dum 2016 la mondo iĝis pli bona loko por la homaro.



En la medio, ni gajnegas epopeajn progresojn, ankaŭ la sano de la oceanoj, la konservado al nehaltigebla revolucio en pura energio! ktp. Ĉiuj bonaj por nia planeto, nia hejmo.

Angle sekvas ligo al 99 progresoj en nia mondo dum 2016

https://medium.com/@angushervey/99-reasons-why-2016-has-been-a-great-year-for-humanity-8420debc2823#...

★★★

Li? Ŝi? Eksmoda?

Mi ricevis la suban mesaĝon de amiko Bill Chapman el Britio. Indus reagi. Mi petas legu, pludonu la informon kaj reagu. Amike, Katja Steele

★★Saluton

Aperis komento mia en ĉ-tiu konservativa katolika retpaĝo australia.

http://www.crisismagazine.com/2016/fighting-pronoun-police#comment-3073901321

Ĉu eble vi povus organizi du-tri respondojn favore al Esperanto?

Bondezirojn Pat and Bill Chapman

★★

Novaĵservo Ret-Info / Lingvo-Studio

La Mesio en Esperanto: unika evento en la kultur-historio de Esperanto

DONACO POR KRISTNASKO: MESIO DE HÄNDEL – EN ESPERANTO



La oratorio MESIO de Friedrich Händel estis prezentata en Esperanto la 29-an de marto en 1987 fare de la fama 100-membra neesperantista koruso de Centra Ensemblo de KISZ.

La koncerto estis parto de la neesperantista projekto "Budapeŝta Printempa Festivalo", kies direktoro Lengyel Márton estis esperantisto. La koncerto mem okazis en unu el la plej elegantaj urbocentraj koncertejoj "Vigadó" en Budapeŝto, kie la spektejo estis plenŝtopita de esperantistoj. Szilvási László prizorgis la sonregistradon de la koncerto, kiu estis eldonita tiam de lia entrepreno **"Lingvo-Studio"** en muzika sonkasedo kiel historia dokumento de nia esperantista kultur-historio.

La sonkasedo jam de multaj jaroj ne plu estas aĉetebla. Ĉi jare la eldonejo decidis liberigi la sondosierojn en la **originala kvalito** por libera uzo - do ili staras nun je via ĝuo kiel senpaga kristnaska donaco de la eldonejo.

Aŭskultu la koncerton ĉe: http://www.eventoj.hu/mesio/

Pri la "Projekto Mesio" Roberto Poort kompilis apartan retpaĝon ĉe lia Aŭd-Vida Studio ĉe http://novajhoj.weebly.com/mesio-projekto.html

Sonregistrado: Lingvo-Studio 1989, Szilvási László. www.eventoj.hu *sendis Katja Steele*

★★

Subtenu nin *http://lernu.net/eo/subteno*

Kontribuu al la disvastigo de Esperanto!
Per via donaco vi helpas nin plu daŭrigi nian laboron!

Por ke lernu! ekzistu kaj funkciu bedaŭrinde ne sufiĉas nur bonegaj kunlaborantoj. Por povi akcepti multajn uzantojn, lernu! uzas multekostan ret-servilon. Por povi sekvi la evoluon de la reto kaj retaj teknikoj, por kreski kaj pliboniĝi, lernu! bezonas diligentajn programistojn. Por ke la uzantoj havu konstantan subtenon kaj respondojn al siaj demandoj en ĝusta lingvo kaj de ĝusta persono, iu devas ĉiam kunordigi tion. Krome lernu! volas pli aktive informi pri Esperanto, premii la plej diligentajn paĝaruzantojn aŭ antaŭen igi lernilojn kaj vortarojn en Esperanto, kaj ankaŭ tio evidente kostas monon.

Pro tio gravas via kontribuo, malgranda aŭ granda! Ni elkore dankas la personojn, kiuj jam donacis al la projekto! Do, se vi havas eblon kaj emon, vi povas finance subteni lernu!

★★

Kiam vi propagandas Esperanton diru ke ĝi estas PLANITA Lingvo ne kreita lingvo.

★★

La Mediala Voĉo .



En Esperanto, kiel en multaj eŭropaj lingvoj, ekzistas kvar gramatikaj voĉoj. Tio estas, ke unu certan bildon, aŭ okazon, en formo de frazo, oni povas alrigardi en kvar diversaj manieroj, el kvar diversaj direktoj. La bildo, la okazo, restas en la kvar tute sama, sen ŝanĝo. Se ekzemple la okazo enhavas viron kaj batadon kaj hundon, tiuj restas ekzakte la samaj en la kvar Voĉoj. La diferenco konsistas nur en la maniero en kiu ni rigardas la bildon.

Jen do la kvar manieroj. En la unua maniero, la plej kutima, oni rigardas unue al la viro, post tio al tio kion li faras, nome la batado, kaj post tio al la ricevanto de la batoj, la hundo. Kutime, sed ne necese, oni diras kio okazas per vortoj en la vicordo de la rigardado. Do La viro batas la hundon.

En ĉi tiu rigardodirekto, kiun oni nomas la Aktiva Voĉo, oni gramatike nomas "La viro" la Subjekto, "batas" la Verbo aŭ la Predikato, kaj "la hundon" la Objekto. Notu ke ne ĉiuj bildoj, ne ĉiuj agoj, povas ĉehavi Objekton; en tiu kazo la okazo povas montriĝi nur en la Aktiva kaj en la kvara Voĉo, la Faktitivo. Notu ankaŭ, ke en Esperanto la Objekto, ĉi tie "la hundo", kutime ricevas la finaĵon "n", do "la hundon", por ke ni klare distingu ĝin en la frazo. La Subjekto ja distingiĝas per la manko de la "n" kaj la manko de prepozicio.

En la dua Voĉo, la Pasiva, oni plej interesiĝas pri, kaj do unue rigardas al, la ricevanto de la ago "bati". Kutime, sed ne necese, oni en la parolo unue diras tiun ricevanton, la hundon. Post tio oni diras la agon, "bati", kaj post tio, se oni volas, la aganton. Do La hundo batatas (de la viro).



Notu ke la precipa interesato, la hundo, nun nomiĝas la Subjekto kaj do ne ricevas la literon "n". Notu ankaŭ, ke la origina aganto, se menciata, ricevas la prepozicion "de". Ĉar la direkto de la rigardado ŝanĝiĝis, renversiĝis, la verbo montras tion alprenante la sufikson "-at-". La ago "bati" ne ŝanĝiĝis, nur nia direkto de rigardado. Kaj notu ankaŭ ke, eĉ se ni ne mencias la originan aganton, ni tamen scias, pro la verba finaĵo "-atas", ke iu aŭ io faras la agadon. Ĉar tio estas la nura diferenco kun la tria Voĉo, la Mediala Voĉo.

En ĉi tiu Mediala Voĉo oni ne scias aŭ ne volas scii, kiu aŭ kio origine faris la agon. Pro la manko de la ideo pri origina aganto, oni montras ke la mediala ago okazas al la nova Subjekto kiu estis la malnova Objekto sen ke ni scias ion ajn pri la malnova aganto, kaj nur KVAZAŬ, sed ne reale, la nova Subjekto ricevus la agon de iu origina aganto, SED NI NE KONAS ĜIN NEK INTERESIĜAS PRI ĜI PUBLIKE. Konsekvence tiu nova

pasiva ago, nomata nun mediala ago, povas okazi pro iu ajn kaŭzo, ekzemple la naturo aŭ cirkonstanco aŭ eĉ si mem. Sed memoru, ke la direkto de nia rigardado estas retroe, same kiel ĉe la Pasiva Voĉo, nur ke ni ĉesas rigardi post mencii la antaŭan Objekton kaj la agon. Jen alia ekzemplo:



Aktiva Voĉo: La infano lavas la ŝtonon (sur la marbordo).
Pasiva Voĉo: La ŝtono lavatas (de la infano) (sur la marbordo).
Mediala Voĉo: La ŝtono laviĝas (pro la marakvo, aŭ pro la sablo, aŭ pro la vento, aŭ pro iu besto aŭ persono, aŭ pro si mem).

Ĉi tiu Mediala Voĉo do estas tre malinforma pri la origina aganto, kaj do tre ŝatatas de leĝistoj; oni ja ne akuzas iun aŭ ion speciale.

Por montri, ke ni rigardas la okazon en la mediala direkto tute ne menciante, nur kvazaŭigante, la originon de la agado, la lavadon, la verbo ricevas la sufikson “-iĝ-“, do “laviĝas”. Tre kutime, sed ne necese, ni diras la okazon en la vicordo de la rigardado, do unue la ŝtono kaj post tio la mediala ago “laviĝas”. Notu ke KAJ en la Pasiva KAJ en la Mediala Voĉo ne povas ekzisti Objekto, nur (Pasiva aŭ Mediala) Subjekto kaj la ago kaj eventualaj cirkonstancoj (loko, tempo, kaŭzo, k.t.p.).

Jen kelkaj aliaj ekzemploj: La koncerto komenciĝos je la oka kaj finiĝos je la deka. La vazo rompiĝis pro la falo. Mi leviĝis frue. La gastoj bonvenigiĝis per urbestra paroleto. La tuta vilaĝo detruiĝis pro la inundo. Ni ellit(ig)iĝos frue. La moskito surpriziĝis per mia frapo. Malleviĝis la suno kaj daŭrigiĝis nia ludado. Pro tio ŝi certe feliĉ(ig)iĝos. Ŝi vest(ig)iĝu rapide!

Marcel Leereveld.

KOMENTO PRI ARTIKOLO DE MARCEL "FALFOLIA"

Mi konsentas kun Marcel, ke ĉiu arbo perdas iujn foliojn iam dum la jaro. Mi rimarkas, ke la eŭkaliptoj en mia malantaŭa korto perdas pli da folioj kiam la vetero estas varma kaj seka. Sed eble pro la fakto, ke mi ne pripensis multe pri la difino "falfolia" kaj blinde akceptis ĝin, mi trovas akcepton de la du novaj (al mi) vortoj "sezonfolia" kaj "jarfolia" nefacila. "Falfolia" jam faras bildon en mia menso de vintre senfolia arbo. Mi ne scias kiujn foliojn la eŭkaliptoj en mia korto perdas. Ĉu ili aĝas jaron aŭ monaton, aŭ eble du jarojn? Mi ne scias. Eble la novaj vortoj ankoraŭ ne tre kontentas min. Ĉu estas aliaj proponoj?

Ĉu mi estas (restas) stultulo blinde akceptanta nelogikaĵojn kiel *Disabled Toilet* kaj *Drawing Pin* en la konfuza angla lingvo? Certe mi ne deziras, ke Esperanto degeneros al tia nivelo!

Terry Manley



ps En Brisbano mi parolas pri mia persona ĝardenumsperto. Venu.

Dankon por la ŝanco legi Esperanton en la novaĵletero.
Terry